

# UJEN



—Cu vere oni bezonas tiel kompliki lingvon? Kiom da samsencaj radikoj! Nur, sol' izol'... Ĉu ne sufiĉis «fraŭl'»?



NE ABONU ANKAŬ



**PAPITU'n** Kataluna satira karikaturo gazeto.  
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jarkvarono. . . . . 2 Ptoj.

Fremdlando: . . . . . 3 >

PELAYO, 35 - BARCELONO

**Neniu malbona esperantisto legas la**

**"FRANCA ESPERANTISTO," n,**

KIUN ONI ABONAS EN

**46, BOUEVARD MAGENTA, PARIS**

**JEN**

akceptas

**Poŝtmarkojn**

de ĉiu nacio por la pago de l'abono



# UJEN

## LA RÊGO-PÂSTISTO

Iam estis reĝo, kiun liaj regatoj detronigis, kaj ekzilis, por anstataŭi lin per nova estro. Ĉar en ĉiu tempo, ŝanĝi estas ago, kiu ne malmulte plaĉas al la homo. Lia edzino ne volis sekvi lin en la foriro, ne pro tio ke ŝi ne amis sian edzon—ĉar ĉiu edzino amas sian edzon—sed tial, ke ŝi havis du malgrandajn fratinojn kaj du gefilojn, pri kiuj ŝi devis zorgi en la ĉefurbo. Liaj gefiloj ankaŭ ne volis sekvi lin, ĉar kompreneble, ili havis patrinon pri kiu ili devis atenti. Neniu volis sekvi lin en lia mizero, ĉar ĉiu havis iun aŭ

alian pri kiu zorgi kaj atenti. Kaj la reĝo, sola foriris tra la monton kun la krono sub la brako, kaj en la animo—la esperon trovi ion por gajni sian vivon.

Marŝante marŝinte, li renkontis paŝtiston, kiu, ĉirkaŭata de sia brutaro, blovis el fluto la plej revigajn ariojn.

—Bona homol—diris la reĝo proksimiĝante al la paŝtisto,—ĉu vi povas okupi min en io por ke mi gajnu por manĝi?

—Kion vi scias fari?—redemandis la paŝtisto haltigante la fajfon kaj sekigante la fluton per la felo, kiu krovis liajn ŝultrojn.

Ĉe tia demando, la reĝo gratis sian kapon rigardante teren, kaj restis longatempe pripensante. Fine,



Babel

### ARTISTAJ FOTOGRAFISTOJ

—Kiel mi pozos, sinjoro fotografisto?

—Atendu! Nun mi dubas ĉu fari Gojaĵon ĉu Rubensaĵon.





—Mi fartas tre bone petante almozon. Mi laboras por mia konto, kaj neniu ekspluatas min.

observinte la ŝafojn, kiuj sin paŝtis ĉirkaŭe, li ekkriis:

—Nu! Mi ja taŭgas por zorgi kaj komandi brutaron: mi lernis tiun ĉi metion en la urbo.

—Se tiel estas—respondis la paŝtisto—mi dungas tuj vin, ĉar ja miaj multaj jaroj ne permesas al mi resti ĉiam sur la pintoj de la montoj kaj postulas de mi pli da ripozo apud la hejma fajro. Mi bezonas helpanton.

—Mi akceptas volonte la dungon—diris la reĝo, kaj, se vi volas, ni povas tuj subskribi kontraktilon por devigi nin reciproke.

La paŝtisto ridetis kaj murmuris:

—Ja oni vidas ke vi venas el urbo. Ĉi tie en la montaro ni ne bezonas devigilojn. La parolo sufiĉas, ĉar ni paŝtistoj havas parolon de reĝo.

—Se tiel estas—diris la reĝo iom honta—vi nur diru al mi, kiun salajron mi ricevos por mia laboro.

La paŝtisto respondis:

—Vi ricevos unu spesmilon ĉiujare.


—Unu spesmilon ĉiujare?—demandis surprizita kaj kriante la reĝo.—Unu spesmilon ĉiujare? Sed, kiel vi kuraĝas proponi al mi tiun mizerajon?

—Ha, mia homo—diris la paŝtisto kaŭrante la kapon kaj levante la ŝultrojn—mi ne povas doni plie; ni estas malriĉaj en la montaro. Se anstataŭ ĉasi kaj amindumi, la reĝo, kiun Dio benu, zorgus pli pri la bestkulturo, alian ridmanieron ni montaruloj havus!

La reĝo pensis, ke pli malbone estus, se la paŝtisto donus al li nenion, kaj akceptis esti dungata por unu spesmilo ĉiujare. Kaj jen ni jam havas nian reĝon fariginta helpanto de paŝtisto. Kiam venis la nokto li sekvis sian mastron al la domo, kaj la sekvantan tagon, kaŝinte la kronon en angulo de la pajlejo, sola li eliris ĉirkaŭata de la brutaro, inter nuboj de polvo, bruo de tintiloj kaj plendblekoj de ŝafoj.

La du unuajn horojn, la afero iradis sufiĉe bone por la reĝo; sed poste, tiu ĉi laciĝis multe, ĉar ne ha-





—Kion vi preferas; unu infanon aŭ unu infaninon?  
 —...Unu aŭtomobilon!

vante la povon blovi el fluto revigajn ariojn—tiuj ĉi estas tre ŝatataj de la ŝafoj, kaj igas ilin sin paŝti kviete sur la kampo—li estis devigata ekkrii la tutan tempon *uŝ! uŝ!* dekstren kaj maldekstren, kaj ĵeti ŝtonojn kaj kuri ĉien por malhelpi ke la brutaro disiĝu.

La reĝo eksidis sur ŝtonegon forte spirante kaj

pensis pri kio li povas fari por atingi la ordon, kiu, estis por li tute sola, neebla. Krom laco li havis dormemon kaj estis lia deziro fermi iom la palpebrojn sub la alloganta ombro de najbara kverko.

Ĉar la deziro estis granda kaj la bezono postulema, li tuj trovis la rimedon kaj metis ĝin en praktikon.





—Ĉu plaĉas al vi, tiu ĉi Sankta-Antono, kiun mi aĉetis?  
—Jes, ja, sed ŝajnas al mi, ke ĝi ne estas tre simila.

El la kvindek tri ŝafoj, kiujn li havis, li prenis dek, starigis ilin kontraŭ si kaj al ili parolis jenmaniere:

—Fieriĝu ho mildaj ŝafoj! En vi dek, mi demetas la honoron de la brutaro, ĉar la brutaro havas honoron, kies gwardanto mi estas. Kaj ĉar la honoro estas en la ordo, por konservi tiun ĉi, vi faros ĉion ajn eĉ kiam vi devos pereji en la celo. Vi zorgos por ke neniu ŝafo malproksimiĝu de la grupo, kaj se io grava okazas, ekzemple, se lupoj venas, vi pli alte ol neniam starigos la honoron de la brutaro, kaj poste vi vekos min.

Tion dirinte, la reĝo iris sterna sin ĉe la ombro de la kverko kaj kompreneble, apenaŭ li turnis la dorson, la unuaj ŝafoj, kiuj disiris, estis tiuj en kiuj li demetis la honoron de l'ŝafaro. Al ili sekvis la aliaj, kaj post kelkaj minutoj, ŝafo esti videbla en nenia punkto de la ĉirkaŭaĵo.

Kiam la reĝo vekiĝis kaj sin trovis tute sola, li



—Ĉu vi nur vendas skribmaŝinojn?... Nu... nul Mi ne scias kribi, kaj mi nur deziris legmaŝinon.



—La koloro multe produktas. Mi ne scias, kial vi, pentristoj, plendas.  
—Kian pentradon vi faras?  
—Mi? Mi estas fabrikisto de koloriloj.





ERIS

—Tre kurioza! Tiel malgranda, kaj li gajnas sian vivon!  
—Pli malgrandaj vi estis, kiam vi komencis gajni vian!





—Ĉu vi jam finis vian poemon?  
—Ne, mia kara; mi ne prosperis trovi rimon al *floro!*  
—Oro.

L. MOY  
PARIS





CRIS


—Ĉu vere, vi fine aĉetos al mi aeroplanon?  
—Jes, certe. Mi ĵus legis, ke tri aeroplanistoj disrompis sian kapon!





—Kian emocion deirante de mia domo! Mi subite havis la eksenton, ke mi forgesis hejme la ĉapelon!





—Aj, aj!... mi kredis ke ĝi estas frankduono!

—Nul! Akcepti butonon kiel moneron! Tio nur povas okazi al neblindulo!

timis freneziĝi pro la nebeo. La unua ideo, kiun li havis, estis, iri al la paŝtisto kaj plendi.

Kiam tiu ĉi—kiu estis apud fajro en angulo de la stalo kudrante al si felsakon—aŭdis de li ke la ŝafoj estas tute disirintaj, li ĵetis furioze la ĉapon sur la teron kaj volis mortigi lin:

—Malspritulo—li kriis—pli ol malspritulo! Kion vi faris, kiamaniere vi agis por ke miaj mildaj kaj obeemaj ŝafoj estu ĉiuj forpaŝtitaj?

—Nul—respondis la reĝo—mi faris kun ili, kion oni faras en el urbo kun la homoj.

—Kion oni faras, diru tuj, por ke mi sciu kia estas via malspriteco!—demandis kolere la maljunulo.

Kaj la reĝo respondis:

—Oni prenas kelkajn homojn el la plej malfeliĉaj, al kiuj oni trudas per konvinko la ideon, ke en ili kuŝas la honoro de la aro. Oni postulas de ili la zorgon

por tiu honoro, kaj ili faras, kaj ĉio iradas bone; kaj poste oni prenas aliajn homojn, kiuj siavice estas kontentegaj havi en si la honoron de la aro, kiuj forgesas ke ili mem antaŭe suferis la premon de la unuaj, kaj siavice ili premas, kaj, ĉio iradas bone... Jen, kion oni faras kun la homoj en la urboj, kaj jen pro kio mi miras ke la ŝafoj estu estintaj tiel nerespektemaj.


La paŝtisto respondis.

—Malsprita urbano! Ĉu vi pretendas kompari la homojn kun la ŝafoj.

Kaj tion dirinte li foriris al la monto, li elblovis el sia fluto la plej revigajn ariojn, kaj iom post iom, la mildaj pacemaj ŝafoj ariĝis ree ĉirkaŭ lin.







— Tio? Ĝi neniam estis tablo por vendado!  
 — Kiel! Sinjoro, mi aĉetis ĝin de deputato!

## NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro . . . 3 Fr. (1,200 sm.)

Jarduono . . . 2 » (0,800 sm.)

# JEN

Eldonisto: RAMON FARRÉ str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la ĈEKBANKO  
 ESPERANTISTA • Merton Abbey. LONDON SW.)

### REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Ver'ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Kiosko 77<sup>a</sup>, 10. Boulevard Capucines. PARIS





# FREMDA HUMORO

GERMANUJO



*Intopcan*



Georgo von Orterer presidanto de la barona Parlamento

OLOF GULBRANSSON



*Sakiele d'Annunzio*



*Paul Hermin*




*Henrik Ibsen*




*Theodore Roosevelt*





—Sed, kiel vi pruvos al mi, ke vi estas persono lerta en negocoj?

—Komunikante al vi, ke via filino min amas.





LA FIRMO

HACHETTE KAJ K<sup>IO</sup>

79, Boulevard Saint - Germain

Paris

APERIGOS BALDAŬ

VORTARON

Esperanto Esperantan

DE KABE

NE AĈETU ĜIN ANTAŬ OL ĜI ESTOS APERINTA

ĈIUJ ESPERANTISTAJ GEJUNULOJ  
ĈIUJ ESPERANTISTOJ DEZIRANTAJ CERTIGI LA ESTONTON DE ESPERANTO

DEVAS LEGI, ABONI, KONIGI LA GAZETON

JUNECO

Oficiale elektitan, ĉe la Barcelona Kongreso, kiel organon por la ĉiulandaj Esperantistaj gejunuloj

JUNECO publikigas propagandajn artikolojn, Kurson de Esperanto, literaturaĵojn plej bone redaktitajn Ĝi estas malfermita al la konkursojn.

KUNLABORADO DE ĈIUJ SIAJ ABONANTOJ

JUNECO estas la **Sola** Esperantista gazeto, kiu publikigas plenan Kronikon pri la tutmonda Esperanta movado ĉe la gejunuloj.

**Specimeno senpage ricevebla**

Jara Abono. . . . . 4 Fr.      Franclando. . . . . 5 Fr.  
Kune kun «Franca Esperantisto». . . . . 6 Fr.

Administrejo: 152 B'-Raspail. — PARIS





ŢE LA KULISOJ

—Ne tiel laŭte parolu! Poste la papago ripetos!